Venu al nia

Zamenhoffesto 2019

Ni invitas ĉiujn al agrabla kunestado dum la ĉi-jara Zamenhoffesto kaj librofesto:

Loko: Kiezspinne - Oranĝerio,
Schulze-Boysen-Straße 38, D-10365 Berlin

Tempo: **Sabate, la 14-an de decembro 2019,**

15:00*-19:00 h

Programo:

- Malfermo
- Festprelegeto „Esperanto-stacio“ en Halbe
- Salutvortoj de gastoj
- Prezentado de interesaj libroj
- Koncerto de Birke kaj Bertilo kaj Alena el Usono
- Halinka kantigas!

Dum la tuta tempo de la aranĝo:

- Libroservo
- Ekspozicio „10 jaroj Zamenhofparko”

Do, venu amase kaj ĝuu internacian kaj neforgeseblan etoson, pligrandigu vian librotrezoron kaj ĝojigu vian stomakon per porokazaj frandaĵoj aŭ simple babilu kun malnovaj kaj novaj amikoj aŭ havu ideojn por kristnaskaj donacoj!

Se vi deziras aldoni specialaĵojn al la manĝotablo (kukoj, kuketoj … estas ofertitaj), bv. kuraĝi! Por ŝatantoj de aliaj manĝaĵoj la kuireja giĉeto malfermiĝos.

Ne estas oficiala partoprenkotizo, sed ni petas mondonacojn („almozkesto“ troviĝas ĉe la enirejo)

Ni vidos nin en Berlino,

Ĝis tiam

Ronaldo

prez. ELBB

Kontakto por aliĝo kaj demandoj pri alvojaĝo aŭ aliaj detaloj: RonaldSchindler@web.de, tel.: +49 1514 1419673

Plej aktualaj informoj sub: https://esperanto.berlin/de/

* preparado ek de la 14-a horo por helpemuloj

2019-10-27